ISSN 2606-0582

# JARRAPORTO de ESPÉRANTO-FRANCE 2024-2025

## Table des matières


Enkonduko.....2
1. Konsciigo (Informado).....2
1.1 Gazetara Komunikado.....2
1.2 Le Monde de l'Espéranto.....2
1.3 Esperanto-Aktiv'.....2
1.4. Foiroj.....3
2. Kapabligo.....4
2.1. Kulturcentroj.....4
Kvinpetalo (Bouresse).....4
Greziljono – Esperanto-Kulturdomo (MCE Grésillon).....4
2.2. Franca Esperanto-Instituto (FEI).....4
2.3. Interretaj kursoj.....5
2.4. KER-ekzamenoj.....5
2.5. Afrika agado.....5
2.6. Ĝemelaj urboj.....5
2.7. Komisio eldono.....6
3. Komunumo.....7
3.1. Butiko.....7
3.2. Sidejo.....9
3.3. Landa kongreso.....9
3.4. Preleg-turneoj.....10
4. Kunordigado kaj funkciado.....10
4.1. Rilatoj kun UEA.....10
4.2. Komitato kaj membraro.....10
Jaro 2025–2026.....10
4.3. Financoj.....11
5. Jarraportoj de la regionaj asocioj.....12
5.1. Fédération Espéranto-Auvergne (Aŭvernio).....12
5.2. Fédération Espéranto-Bretagne (Bretonio).....12
5.3. Fédération Espéranto-Centre-Ouest.....12
5.4. Fédération Espéranto-Limousin.....13
5.5. Fédération Espéranto-Nord (Nordfrancia Esperanto-Federacio).....14
Regiona kunordigado.....14
Informado kaj komunikado.....14
Kulturo kaj aranĝoj.....15
5.6. Fédération Espéranto-France-Est (Orientfrancio).....15
5.7. Fédération Espéranto-Paris-Île-de-France (Parizo-Francilio).....19

5.8. Fédération Espéranto-Provence (Provenco)....20
5.9. Fédération Espérantoccitanie....21
5.10. Federacio Normandio....21
5.11. Autres groupes....22
6. Jaraj raportoj de la fakaj asocioj....23
6.1. Espéranto-Jeunes (JEFO)....23
6.2. ILEI-Francio....23
6.3. TAKE (Tutmonda Asocio de konstruistoj esperantistaj)....25
6.4. FKEA ( Franca Katolika Esperantista Asocio )....26

# Enkonduko

Ĉi-jare denove ni proponas al vi Jaran Raporton de Espéranto-France, prezentatan kaj ordigatan laŭ la strukturo de la laborplano de la estraro de UEA, tio estas laŭ la 4 K: Konsciigo, Kapabligo, Komunumo kaj Kunordigado.

Se vi havas demandojn, vi povas fari ilin dum la Ĝenerala membrokunveno okazonta sabaton la 23an de majo de la 10a kaj 30 ĝis la 12a, aŭ skribi al estraro@esperanto-france.org.

Grandan dankon al ĉiuj estraranoj kaj komisiitoj, kiuj kontribuis al la kompilado de la Jara Raporto : Emmanuelle Richard, Raymonde Coquisard, Pierre Gauthier, Bert Schumann, Renée Triolle, Axel Rousseau, Katalin Kovats, Bruno Robineau, Saïd Baluĉi, Régis Fabre, Jean-Pierre Bertrand, Didier Janot, Pierre Grollemund, Jean-Luc Thibias, Edmond LUDWIG, Brigitte Guindolette, Bruno Henry, Thierry Spanjaart, Isabelle Nicolas, Benoît Ente, Bertrand Verstraete, Xavier Godivier, Marcelle Provost

Agrablan legadon deziras al vi,

La estraro de Espéranto-France.

# 1. Konsciigo (Informado)

## 1.1 Gazetara Komunikado

## 1.2 Le Monde de l'Espéranto

- Redakta teamo: Bruno Flochon, Emmanuelle Richard, Gilles Tabard. Grafika laboro : Emmanuelle Richard
- La teamo bezonis pripensi la venontan formon de la gazeto do konsekvence, neniu numero de la revuo aperis dum la jaro 2024/2025.
- Nova teamo baldaŭ aperos. Nova numero aperos antaŭ la lerneja jaro 2026/2027.

*Raportis Marcelle Provost*

# 1.3 Esperanto-Aktiv’

- Post jara paŭzo en 2023, Esperanto Aktiv aperis inter januaro 2024 kaj junio/aŭgusto 2024 kaj denove ekde februaro 2025 por aperigi nuntempe ĉiun duan monaton.
- Kutimaj rubrikoj : Kalendaro (Okazos), Ils l’ont fait (Okazis)… Intervjuo de respondeculoj de asocioj aŭ spertuloj.
- La skipo estas iom modifita : Raymonde Coquisart estas la kunordigantino kaj zorgas pri « Ils l’ont fait… », Dominique Lacambre pri Kalendaro kaj Emmanuelle Richard pri reteja mastrumado kaj reta dissendo. Pierre Dieumegard regule sendas diverstemajn informojn.

*Raportis Raymonde Coquisart*

# 1.4. Foiroj

Kiel kutime, Esperanto-Francilio partoprenis nome de Esperanto-Francio diversajn foirojn
- Foiro pri matematikaj ludoj (12-15/06). Organizis François Lo Jacomo (FLJ) AL Deĵoris Elisabeth Barbay (EB), FLJ, Lucien Bresler, Pierre Gauthier (PG), Sarah, LPI, VS, Laurent V. Helpis ordigi Nathalie K.
La rezulto estis kontentiga. Refoje allogaj estis la duonhoraj kursoj de EB, kiujn ĉeestis deko da lernejaj grupoj. Estis deĵorantoj kaj la publiko interesiĝis. Vizitis la budon interalie Cédric Villani, fama matematikisto, Peter Balaz kaj Dorota Rodzianko, Kongresa Fako de UEA, kaj Aleks Kadar.

- 29/06, prezento de Esperanto al Mensa en Parizo, fare de PH, helpe de Julien Darrasse kaj François Lo Jacomo, bone okazis. 10 partoprenantoj plenkreskuloj kaj poste kelkaj infanoj.
- Festo de asocioj de Paris Centre (06/09), ĉe la urbodomo rue Eugène Spuller, la tutan tagon. Nia asocio havis budon. Deĵoris AL, LPI. Legu la raporton en Esperanto-Aktiv.
- Homara Festo (12-14/09), en Brétigny-sur-Orge. La budon pagis EF. Organizis Vilĉjo. Deĵoris Lucien, Bubalo, Platano, Gijom Armide, Christian, VS, Sarah, PG. Legu la raporton en Esperanto-Aktiv.
.
- Malfermaj pordoj (27/09), dum la posttagmezo, en nia sidejo. Deĵoris LPI, PG.
- Unuhora fulmkurso (03/10), en nia sidejo. Gvidis Didier Janot.
- Salon européen de l'éducation (21-23/11), en Parc des expositions, Parizo. EF pagis (1590€ TTC) por la budo (la prezo por firmao estas 6.000€ HT). Organizis FLJ, PG. Deĵoris LPI, Régis Fournier, Lucien Bresler, Jérôme Auclair, Laurent Vignaud, Sarah, VS. Legu la raporton en Esperanto-Aktiv.

*Raportis Federacio Francilio*

# 2. Kapabligo

## 2.1. Kulturcentroj

### Kvinpetalo (Bouresse)

Ni ne ricevis raporton. Por pliaj informoj konsultu la retejon http://kvinpetalo.org/

### Greziljono – Esperanto-Kulturdomo (MCE Grésillon)

Espéranto-France ree iĝos komitatano de Greziljono de 2026 ĝis 2030. Reprezentanto de Espéranto-France: Xavier Godivier. Jen raporto pri la civila jaro 2025.

1. *Propraj staĝoj*
   - Entute dum 73 tagoj kun 425 homoj.
   - Printempa kursaro, ĥoro Interkant kaj BEMI biciklado en aprilo kaj majo,
   - **T**urismaj ekskursoj post le kongreso de Esperanto-France en Nanto en junio,
   - Maratona kursaro kun IEK kaj kongreso de blindaj e-istoj, staĝo *Échanges de savoirs*, Infana semajno, SAT-kongreso, Naturisma semajno en julio kaj aŭgusto.
   - Staĝo *Aŭtune* kaj ĥoro Interkant en aŭtuno.
   - NB: inter tiuj stagoj kalkuliĝas ankaŭ la SAT-kongreso kaj naskiĝfestoj de esperantistoj, tiukaze Greziljono zorgas pri la tranoktoj kaj manĝoj, dum la organizanto pri sia programo.
   - Laboroj kun volontuloj okazis dum ĉirkaŭ 17 tagoj kaj aliaj semajnfinoj por ripari kaj ĝardenumi. Venu volontuli!

2. *Aliaj okazaĵoj*
   - Luado al grupoj ne-esp-istaj (kaj 3-foje e-istaj) por financi laborojn: 25 luoj dum 83 noktoj. E-istoj ĝuas rabaton!
   - Krom nia kutima programo, kursoj kaj aktivaĵoj por infanoj kaj plenkreskuloj, kun gastoj el diversaj landoj kaj amika etoso, ni serĉas E-asociojn kaj aliajn partnerojn, kiuj okazigu en Greziljono siajn proprajn kongreson aŭ staĝojn.
   - Laboroj: Finiĝis la novigo de la kastela tegmento. Nun la ĉambro 34 iĝas nia 2a PMR-ĉambro.
   - Hungara paro Veronika kaj Andraŝ loĝas ekde decembro daŭre en Greziljono por malpliigi la laboron de alia ĉefa volontulo.

   Por pliaj informoj konsultu la retejon https://gresillon.org/

*Raportis Bert Schumann*

## 2.2. Franca Esperanto-Instituto (FEI)

FEI estas instanco komuna al Esperanto-France kaj SAT-Amikaro, kies reprezentantoj alelektas eminentulojn. Ĝia rolo estas duobla: organizi ekzamen-sesiojn kaj korekti lernolibrojn aŭ eldonaĵojn. Ni bedaŭras la erarojn en regionaj gazetoj: ni ilin malkovras nur post apero!

Francaj ekzamenoj suferas pro la konkurenco de la KER-ekzamenoj, tamen ili ne similas: la francaj lasas lokon al Esperanto-kulturo kaj historio de la Esperanto-mondo, ne nur al la lingvo! Ili estas tri-nivelaj: atesto pri lernado, atesto pri supera lernado kaj Kapableco (pri Pedagogio/pri Turismo/pri scienco)

Okazis 3 sesioj: dum la kongreso de SAT-amikaro en Vigi la 24an de majo, kun 2 kandidatoj ĉe la 2a nivelo; dum la kongreso de Esperanto-France en Nanto la 10an de junio, kun 3 kandidatoj por la 1agrada kaj 1 por la 2a; en Marseille la 22an de junio kun 2 + 2 kandidatoj.

Sesio por la komuna trunko de Kapableco (kun altraduko, detraduko kaj verkaĵo pri la 4 programitaj libroj)

antaŭvidita en Greziljono la 2an de novembro ne okazis pro manko da kandidatoj.

La malgranda nombro da kandidatoj klarigiĝas verŝajne pro manko de publikaj kursoj (ĉe retaj aŭ perkorespondaj kursoj mankas stimuligo). Same, ne ekzistas laŭ mia scio, kurso por prepari kandidatojn al la Kapableco kaj la ŝtupo inter la 2a kaj 3a gradaj ekzamenoj estas sufiĉe granda.

Ne hezitu informiĝi ĉe la reto aŭ vin turni al mi se vi planas organizi ekzamensesion! Kuraĝon!
Por pliaj informoj konsultu la retejon http://www.franca-esperanto-instituto.net/

*Raportis Renée Triolle*

# 2.3. Interretaj kursoj

Espéranto-France mastrumas 3 interretajn kursojn: la *Cours gratuit d'espéranto en 10 leçons* por novuloj, *Gerda Malaperis* por meznivelaj lernantoj kaj *Paŝoj al Plena Posedo* de William Auld por progresintaj lernantoj.

28 volontuloj korektas tiujn kursojn. Dum la 12 monatoj de oktobro 2024 ĝis septembro 2025, 375 lernantoj aliĝis kaj 23 finlernis la elektitan kurson.

Ni konscias, ke la nombro de lernantoj malkreskis, kaj indas trovi novajn rimedojn por vigligi niajn kursojn. La ĉefa bezono estas allogi lernantojn al nia retejo kaj instigi ilin komenci lerni kaj daŭre lerni ĉiutage. Ni scias, ke aliaj retejoj kiel Duolingo havas spertajn psikologojn, kiuj povas krei diversajn ilojn por reteni la lernantojn. Ni bedaŭrinde ne havas la saman homforton, tamen ni plu klopodas plibonigi nian retejon.

Ĉi-jare ni lanĉis novan retejon: https://nilegu.esperanto-france.org/
Tiu retejo helpas la lernadon per legado de tekstoj. Eblas musklaki sur vorto por vidi la tradukon, kaj multaj tekstoj havas laŭtlegitan version danke al diversaj volontuloj. Indas reklami tiun retejon. Ĝi estas grava ilo por lerni Esperanton kaj por instigi lernantojn al legado.

*Raportis Axel Rousseau*

# 2.4. KER-ekzamenoj

Pro malfrua demando kaj personaj devigoj de Katalin Kovats, ni ne ricevis raporton ĉi tiu jaro.

# 2.5. Afrika agado

En 2025, ni sendis unufoje 10 librojn al Afriko:

18an de aprilo Fakturo F25_211 555,60 €

# 2.6. Ĝemelaj urboj

Denove estis organizitaj 2 retaj kunvenoj el ĝemelaj urboj Parizo/Romo… kaj foje estis invitita Darmstadt (Germanio). Tre agrabla etoso inter tiuj tri urboj. Troyes estas ĝemelita kun Darmstadt ekde de 1958 kaj estis partopreno de du esperantistoj el Troyes 0 TIU TRILANDA KUNVENO…

Oftaj partoprenoj al retaj kunvenoj de Seŭlo tre interesaj… Regula ĝisdatigo de la paĝo Ĝemelaj urboj sur Fejsbuko kaj aperigo de informoj pri kunvenoj tra la mondo kaj pri kontaktoj kun Radio Havana kaj Pola Radio.

# 2.7. Komisio eldono

De oktobro 2024 ĝis septembro 2025, Esperanto-France eldonis nur unu novan libron: Tri rakontoj. Trois contes (dulingva) de Gustave Flaubert, tradukita de Thierry Tailhades.

La libro estas dulingva, franca kaj Esperanto.

Ĉiuj libroj eldonitaj de Esperanto-France estas prezentitaj en nia retejo en la rubriko "Edition" : https://esperanto-france.org/edition

*Raportis Emmanuelle Richard*

# 3. Komunumo

## 3.1. Butiko

Reta butiko: [butiko-esperanto-france.org](butiko-esperanto-france.org)

Plej bonaj vendoj dum la jaro 2024/10/01 al 202/09/30 (20 plej bonaj):

| | |
|---|---|
| L'espéranto c'est dans la poche | 270 |
| La Eta Princo | 190 |
| La Templo de l'suno | 75 |
| Metodo 11 (édition 2020) | 45 |
| Espéranto par la méthode directe | 35 |
| Elementaj principoj de milita propagando | 30 |
| La libro de la mil kaj unu noktoj (entute 3 volumoj) | 27 |
| Tri rakontoj. Trois contes | 26 |
| Inès en Okcitanio | 26 |
| Poŝamiko | 23 |
| Dictionnaire de poche (Poŝvortaro F/E - E/F) | 23 |
| Pack dictionnaires (FR>EO + EO>FR) | 20 |
| Sur bluaj planedoj | 20 |
| Stranga malapero | 18 |
| Reĝo Ubuo | 18 |

| | |
|---|---|
| Cours rationnel d'espéranto (éd. 2006) | 16 |
| La sekreta vivo de miaj najbaroj | 16 |
| Dictionnaire pratique edition 2014 | 13 |
| Tinĉjo en Tibeto | 13 |
| PIV 2020 Plena Ilustrita Vortaro | 11 |
| Metodo 12 (pour améliorer l'étude) | 11 |
| La Nigra insulo | 11 |
| Pri kio temas? | 10 |
| Ĉiuj Superherooj | 9 |
| Nouveau cours d'espéranto | 8 |

(1) La libro *Sur Bluaj Planedoj* vendiĝas ankaŭ rekte ĉe lulu.com kaj aliaj retaj librovendejoj. En tiu ĉi tabelo, ni notis la sumon de la vendoj en nia butiko kaj en la butiko ĉe lulu.com kaj aliaj retaj butikoj. Ni konsideris la "normalan" eldonon kaj la libron en grandaj literoj kiel saman libron.

*Raportis Saïd Baluĉi*

Kaj la vendoj per lulu.com

| | Libroj | E-libroj |
|---|---|---|
| Sur bluaj planedoj | 24 | 2 |
| Elementaj principoj de milita propaganto | 5 | |
| Inès en Okcitanio | 5 | |
| Reĝo Ubuo | 8 | |
| 1001 nokoj | 1 el ĉiu volumo | |
| Tri rakontoj | 7 | |

*Raportis Emmanuelle Richard*

# 3.2. Sidejo

La sidejo funkciis bone kaj glate kiel la pasintaj jaroj. Jen kelkaj niaj faritaj taskoj titole:
- Akcepti multajn enlandajn kaj eksterlandajn vizitantojn.
- Ricevi kaj trakti telefonalvokojn, retmesaĝojn, paperajn korespondojn.
- Kunlabori kun Espéranto-Paris por okazigi kursojn, festojn, kultur/babil-rondojn ktp.
- Prepari kaj sendi 548 (pasintjare estis 928) fakturitajn mendojn al niaj membroj kaj klientoj.
- Aĉeti kaj aranĝi 43 (pasintjare estis 75) fakturitajn libro-aĉetojn de UEA, Sat-amikaro, Mondial, Kava Pech kaj aliaj.
- Dissendi la aliĝilon (bulletin d'adhésion 2024-2025), papere kaj rete.
- Registri kaj trakti (re)aliĝojn de tiuj kiuj sendis ĉekon aŭ pagis kontante aŭ per sia bankkarto en la sidejo.
- Peri la (re)aliĝojn al UEA kaj ILEI por tiuj membroj kiuj volis fari tion pere de Esp FR.
- Aranĝi la abonojn al diversaj internaciaj revuoj.
- Helpi la esploristojn por serĉi en nia arkivo pri diversaj materialoj. Tion faras Régis Fournier.

Nia regula skipo surloke konsistas el Maria Fessl (nur marde) Régis Fournier (arkivo) Said Baluĉi (lunde, marde, merkrede, ĵaŭde)

*Raportis Said Baluĉi*

# 3.3. Landa kongreso

La jara kongreso de Esperanto en Francio okazis en Nantes kaj kunigis 148 esperantistojn el 8 landoj de la 7a ĝis la 9a de junio 2025. La organiza teamo elektis la temon « vojaĝo », ĉar tra sia tuta historio la haveno de Nantes rilatis kun la oceano kaj la transmaraj landoj, kaj nuntempe la urbo masive investas en kulturon, interalie per la ĉiujaraj artaj eventoj nomataj « *La Vojaĝo en Nantes* ».

La kongresejo situiĝis ideale apud la stacidomo, tute proksime de la urbocentro kaj ofertis ĉiujn salonojn necesajn kaj komfortajn.

La temo vojaĝigis la kongresanojn tra la mondo kaj tra la jarcentoj: oni parolis pri la fama verkisto Jules Verne, naskiĝinta en Nantes, kaj lia rilato al Esperanto. Ni ankaŭ sekvis la spurojn de Lucien Péraire, juna esperantisto kiu biciklis tra Eŭropo kaj Azio de 1928 ĝis 1932 por « kompreni la kialojn de la militoj ». Pascal Dubourg-Glatigny prezentis la imponan laboron de sciencistoj kaj esperantistoj por savi la esceptajn dokumentojn de Péraire (liaj taglibroj, fotoj, poŝtkartoj…). Tiu odiseo estis ankaŭ prezentita pere de ekspozicio de paneloj malfermatata al la ekstera publiko.

La vojaĝo daŭris kun Gabin Forcier kiu antaŭ kelkaj jaroj petveturis 20 000 kilometrojn tra Eŭropo dum 6 monatoj renkonte al esperantistoj (https://www.youtube.com/watch?v=6m3Ffodblyk); bildoj el Tanzanio memorigis pri la tiea UK.

Oni povis ankaŭ spertiĝi pri origamio, la japana paper-faldarto, aŭ komenci la tagon bonhumore en la ateliero de ridjogo. Dimanĉon okazis ekumena renkontiĝo.

La proponitaj ekskursoj ebligis konatiĝi kun la historio de Nantes, kaj enprofundiĝi en la vivon de Jules Verne tra la muzeo al li dediĉita. Nantes nuntempe famas pro siaj fantaziegaj maŝinoj: giganta 48-tuna elefanto el ligno kaj ŝtalo, kiu promenas ĉiutage sur la placego; araneo, kameleono, kaj tiom da aliaj gigantaj mekanikaj bestegoj eksterordinaraj. Mondo laŭ Jules Verne...

Sabate vespere la kongresanoj kuniĝis ĉirkaŭ abunda kaj festa tablo por la « aperitivo de la regionoj », kiam ĉiu alportas iun manĝeblan aŭ trinkeblan specialaĵon el sia regiono. Dimanĉe ni povis daŭre vojaĝi ĉetable kiam oni servis kurdan tagmanĝon.

Nokte, la duopo Abeloj vojaĝigis la ĉeestantojn en la tuta mondo, tra landoj, kie ili rikoltis muzikojn kaj kanzonojn, diverslingve, interalie en esperanto. Kaj poste sekvis balo kun popolaj kaj bretonaj dancoj. En alia vespero, Kajto? LA MONDFAME KONATA NEDERLANDA PARO plezurigis la ĉeestantoj per sia energio kaj bonhumoro.

Jen komentoj de kongresanoj:

*« Mi tre ĝuis la kongreson en Nantes: kongresejo perfekta, bone funkcianta trinkejo, komuna manĝo, balo por ke ĉiuj generacioj kuniĝu, tre viglaj koncertoj. »*

*« Mi ŝategis la kongreson; certe mi partoprenos aliajn renkontiĝojn. » Unuafoja partopreno en esperanta renkontiĝo de komencanto 20 jaraĝa.*

Eltiraĵo el la Ondo de Esperanto

*Raportis Bruno Robineau*

La kompleta programo estas videbla sur la paĝo :*https://kongreso2025.esperanto-france.org/?lang=fr*

## 3.4. Preleg-turneoj

Ni ne ricevis raporton. La komitato konscias pri la bezono proponi novajn turneojn kaj komencis krei teamon de respondeculoj en ĉiuj regionoj por kunordigi tiun agadon. Se via loka asocio deziras partopreni kontaktu la estraron estraro@esperanto-france.org

# 4. Kunordigado kaj funkciado

## 4.1. Rilatoj kun UEA

Michael-Boris Mandirola estis komitatano A ĉe UEA por reprezenti Espéranto-France por la periodo de 2022 ĝis 2025. Ekde la somero 2025, Aleks Kadar estas la reprezentanto de Esperanto-Francio en la konsilio, samtempe li rolas kiel ĝenerala sekretario.

Jen la nombro de francaj esp-istoj kiuj partoprenis la UK 2025 en Brno (https://uk.esperanto.net/2025/aligxintoj) : 98 kaj en a Virtuala Kongreso dum la fino de novembro 2024 (https://vk.esperanto.net/2024/aligxintoj/) : 78.

## 4.2. Komitato kaj membraro

### *Jaroj 2025–2026*

Tradicie la komitato kunvenas fizike kvarfoje jare: 1afoje dum 2hora kunveno post la membrokunveno dum la kongreso, por elekti la novan estratron, 2afoje dum tuta dimanĉo de oktobro en la pariza sidejo, 3afoje simile en januaro, kaj 4afoje dum 2hora kunveno antaŭ la membrokunveno dum la sekva kongreso.

De kelkaj jaroj tiuj fizikaj kunvenoj fariĝis hibridaj kun la ebleco partopreni per interreto. Ekde majo 2025 aldoniĝis unu aŭ pluraj 2-horaj retaj kunvenoj inter la fizikaj kunvenoj kaj tiel aktivigi iom pli la komitaton.

Por la jaro 2025/2026, nova komitato estis elektita en junio 2025 en Nanto. La komitato kunvenis kvar fojojn persone en junio 2025, en oktobro 2025, en januaro 2026 kaj kunvenos en majo 2026 en Hérouville Saint Clair. La komitato kunvenis kvinfoje per reto: en julio, septembro, novembro 2025, marto 2026 kaj kunvenos majo 2026. Plie de tiuj kunvenoj, la estraro kunvenas almenaŭ unufoje monate.

Ĉiuj protokoloj de la komitat-kunvenoj estas legeblaj en nia retejo, atingeblaj per la maldekstra flanka menuo *Espéranto-France / Actions et comptes-rendus / Conseil d'administration* :

https://esperanto-france.org/conseil-d-administration

**Reprezentas la membrojn (2024-2025):**

★ Raymonde COQUISART★ Régis FABRE ★ Bruno FLOCHON ★ Clément Genty (demissiis) ★ Xavier GODIVIER ★ Aleks KADAR ★Michaël-Boris MANDIROLA ★ Sébastien MONTAGNE ★ Marcelle PROVOST ★ Bruno ROBINEAU★ Viktor SIMONNET★ Bertrand VERSTRAETE

**Estraro (2024-2025)**

• Prezidanto: Xavier Godivier
• Ĝenerala sekretario: Marcelle Provost
• Vic- sekretario : Viktoto Simonnet
• Kasisto: Régis Fabre
• Prelegvojaĝoj: Régis Fabre
• Korespondanto pri Esperanto Aktiv: R. Coquisard
• Komputaĵoj: Sébastien Montagne
• Eksterkomunikado: Pierre Gauthier


**Reprezentantoj de la membraj asocioj (2024-2025):**

• Aŭvernio: malapero
• Bretonio: Claude Bensimon
• Francilio: Pierre Gauthier
• Limoĝio: Isabelle Nicolas
• Norda Francio: Xavier Dewidehem
• Orientfrancio: Jean-Luc Thibias
• Provenco: Thierry Spanjaard
• JEFO (junuloj): Briac Millon
• GEE (instruistoj/antoj): Didier Janot

**Membraro:**

Estis 598 membroj fine de 2025. Kontraŭ 618 membroj fine de 2024 kaj 589 membroj je la fino de 2023. Por memoro 616 membroj je la fino de la periodo 2021-2022 (30a de septembro 2022) kaj 612 membroj je la fino de la periodo 2020-2021 (30a de septembro 2021). En 2026, la nombro jam superas 600 dum restas kelkaj monatoj por aliĝi.

**La nombro de membroj estas sufiĉe stabila dum la lastaj 15 jaroj** sed indas substreki ke tio estas dank'al kreskanta kontribuo de la partneraj lokaj asocioj kiuj aliĝis al la komuna kotizo-sistemo**. Pli ol duono de la membraro venas en 2025 pere la lokaj asocioj**.
Indas kompreni ke tiu stabileco kaŝas malkreskon de la nombro de individuaj membroj kiuj aliĝis rekte kaj ne pere de loka asocio. Tio montras malkreskon de la franca Esperanto movado, kun malapero de asocioj. Tiel inter la 27 asocioj kiuj aliĝis al la komuna kotizo-sistemo, 9 ne plu aktivas aŭ malaperis.
Bona novaĵo: lastan jaron aliĝis al la sistemo pliaj asocioj: Tours kaj Plouézec sekvita ĉi jare de Herouville-Saint-Clair, Hennebont kaj Lorient.



| Jaro | Nombro | **Aliĝo al la komuna kotizsistemo de lokaj asocioj aldonantaj ĉiujn siajn membrojn al Espéranto-France, ekde 2013** |
|---:|---:|---|
| 2009 | 662 | |
| 2010 | 639 | |
| 2011 | 594 | |
| 2012 | 543 | |
| 2013 | 543 | Béziers |
| 2014 | 637 | Gap, Bourg-en-Bresse, Nîmes, Albertville, Moûtiers, Périgueux, Strasbourg |
| 2015 | 663 | |
| 2016 | 613 | Marseille, Dôle |
| 2017 | 577 | |
| 2018 | 603 | Orléans, Valenciennes |
| 2019 | 671 | Lyon, Lille, Arras |
| 2020 | 632 | Limoges |
| 2021 | 611 | Saint-Brieuc |
| 2022 | 615 | Rennes |
| 2023 | 571 | |
| 2024 | 607 | Nantes, Romans |
| 2025 | 596 | Tours, Plouezec |
| 2026 | 619 | Hérouville, Lorient, Hennebont |

## 4.3. Financoj

Vd. la financan raporton: [https://esperanto-france.org/finances/2025](https://esperanto-france.org/finances/2025)

# 5. Jarraportoj de la regionaj asocioj

## 5.1. Fédération Espéranto-Auvergne (Aŭvernio)

La federacio ne plu ekzistas.

## 5.2. Fédération Espéranto-Bretagne (Bretonio)

**Agadraporto 2025 de la Federacio Esperanto-Bretonio / Fédération Espéranto-Bretagne**

La Federacio Esperanto-Bretonio organizas komunajn agadojn por la lokaj asocioj de Bretonio:

**Lokaj grupoj** (substrekitaj) **aŭ kontaktoj** sen substreko:

• Côtes-d'Armor: Armor-Espéranto (Saint-Brieuc, Lannion, Pleudaniel, Dinan-Plélan-le-Petit-Ploubalay); Plouézec, Rostrenen.

• Finistère: Douarnenez, Morlaix.

• Ille-et-Vilaine: Rennes, Montfort, Saint-Malo, Pleugueneuc.

• Morbihan: Vannes, Sarzeau, Hennebont, Pontivy, Lorient, Pluvigner.

• Loire-Atlantique : Herbignac, Nantes, Saint-Nazaire, Saint Aignan de Grand lieu, Couëron.

*Notindas ke la asocioj de departemento Loire-Atlantique ne membras en la federacio laŭstatute ĉar estas en alia administra regiono sed ekzistas regula kunlaboro kun tiuj lokaj kluboj, inter alie pri organizo de prelegturneoj.*

**Membraro**: ĉirkaŭ 100. Inter ili estas 72 membroj kiuj membras ankaŭ en Espéranto-France, el kiuj plej multe partoprenas al la komuna kotizo de la klubo kun Espéranto-France: Armor Espéranto, Espéranto-Plouézec, Espéranto Rennes, kaj ekde ĉi jare Hennebont kaj Lorient).

**Agoj de la federacio:** Eldono de la federacia bulteno **Verda Triskelo** (VT) kun 2 numeroj dum 2025, aŭtune kaj printempe danke al la teamo de Hélène, Chantal kaj Josette.

***Turneoj kaj vizitoj** de eskterlandaj Esperantistoj:*

- Turneo de fama pola esperantisto Józef Częścik dum marto kaj aprilo en Rostrenen, Saint-Brieuc, Rennes kaj Nantes. (legu pli en VT55)

- Turneo de Denis Keefe en pluraj kluboj: Rostrenen, Saint-Brieuc kaj Rennes. (VT56)

- Vizito de Litovino Vida en Vannes. (VT55)

Ĝisdatigo de nia retejo kun listo de kontaktoj, prezento de Verda Triskelo, alvokoj al membrokunvenoj kaj agadraportoj de la Federacio: http://bretonio.esperanto-france.org/ administrantoj: Bert kaj Xavier.

**Reta diskutlisto** “Bretonio” de la membroj gastigata de Esperanto-France: bretonio(a)esperanto-france.org kun pli ol 200 abonantoj, administrata de Xavier. La diskutlisto ricevis pli ol 90 mesaĝoj dum 2025. Por aboni sufiĉas sendi malplenan mesaĝon al bretonio-abono(a)esperanto-france.org

Retaj kunvenoj de la komitato por la administrado kaj organizo de la membro-kunveno.

**Jara kunveno** okazis en Nanto kadre de la Interasocia kongreso de Esperanto en Francio, la 7a de junio 2025.

# 5.3. Fédération Espéranto-Centre-Ouest

Tiu federacio ne plu funkcias de multaj jaroj. Tamen du lokaj grupoj de tiu regiono aliĝis al la interasocia kunkotiza sistemo: Orleans kaj Tours. Ili ne multe kunagadis dum la jaro 2024 sed ambaŭ sendis sian jarraporton. Vi trovos ilin ĉe la reto de Esperanto-France.

Ambaŭ grupoj instruas Esperanton al gelernantoj kaj partoprenas en diversaj publikaj manifestacioj por promocii la internacian lingvon.

Revivigo de la federacio estas nun pripensata.

Jen raporto de Nantes :

- Organisation d'un week-end de découverte de l'espéranto à St Aignan-de-Grand-Lieu les 5 et 6 octobre 2024 : conférences, promenade en barque sur le lac, concert de Jomo... Le bal folk/fest-noz a réuni espérantophones et non espérantophones pour une soirée de musique et de danse.
- Participation locale à l'évènement national "La Fête des Possibles" "pour une société plus durable, humaine et solidaire" : public potentiellement ouvert à des alternatives, donc à l'espéranto.
- Intervention en visio dans un lycée au Luxembourg sur le thème "Voyage et Espéranto" dans le cadre d’un projet interdisciplinaire sur le thème du « vivre ensemble interculturel » .

Et comme de coutume :

- cours hebdomadaire pour débutants de septembre à juin ; cours mensuel pour niveau inermédiaire et rencontre mensuelle "Babilado".

Le premier semestre 2025 ayant été occupé par l'organisation du congrès national, nous n'avons pas mené d'actions spécifiques pendant cette période.

*Redaktis Bruno Robineau*

Jen raporto de Orleano

- Nous avons tenu une A.G. extraordinaire le 21 juin 2025 pour acter la fusion entre Espéranto-Loiret & Espéranto-Développement 45.

- À Orléans ou Pithiviers, des cours, des conférences, des rencontres sont organisées, régulièrement ou ponctuellement.

- Des stages sont régulièrement organisés, le samedi ou le dimanche. Cette année, le stage d’avril a été l’occasion d’une rencontre avec 2 espérantistes cubains : http ://esperanto.loiret.free.fr/1/index.php ?article21/avril-2025.

- Sur le fédivers3, nous avons : • un compte chez LibertaVideo (diffusion de film):

esperanto_45@video.liberta.vip, • un chez MastodonSocial (diffusion rapide d’information, l’agenda par exemple) : @esperanto45@mastodon.social

*Raportis Marcelle Provost*

# 5.4. Fédération Espéranto-Limousin

La jaro 2025 estis markita de nova malsukceso, kun la akcidento de la filo de Antoine kaj Isabelle Brunel kaj ilia posta translokiĝo al Tuluzo. Ĉi tiu translokiĝo sekvis la mortojn de du el niaj pli aktivaj membroj, Clair Mahé kaj Isabelle Jacob, kaj grave komplikis la vivon de nia asocio.

En Brive, ni partoprenis la asocian forumon en septembro, kun multaj pozitivaj renkontoj, sed neniuj novaj membroj. En novembro, ni devis nuligi nian partoprenon en la Solidareca Festivalo. Lucia estis malsana, kaj mi devis foresti. Ni ankaŭ ne renovigis nian prezenton ĉe la mezlernejo D'Arsonval. Tamen, ni konservis niajn semajnajn ĵaŭdajn klasojn, kiuj estas tiom socia kunveno kiom formala leciono. Aparte, ni legis "Inès en Okcitanio", la bonegan libreton de Laure Patas d'Illiers.

En Limoges kaj Saint-Junien, agadoj kaj klasoj daŭris pli-malpli regule; mi lasos vin paroli pri tio. En oktobro, ni partoprenis la Festivalon "Foutez-nous la paix" en Saint-Junien.

Isabelle Nicolas sukcese celvarbis por ke ni havu oficejon en Limoges. Ĉi tio nun estas plenumita, kaj ni gratulas ŝin.

Ni okazigis kelkajn Babilkunvenojn: la 5-an de julio, la 16-an de novembro ĉe la domo de Cathy en Saint-Sulpice-Laurière, kaj la 20-an de decembro ĉe mi.

Danke ĉefe al Antoine kaj Pierre, ni sukcesis eldoni du numerojn de Babilemo, unu printempe kaj unu fine de la somero. La translokiĝo de Antoine al Tuluzo komplikas la aferojn, sed li konsentis daŭrigi la laboron pri ĝi.

Pri la financoj, Bertrand De la Porte, kiu pardonpetas pro tio, ke li ne povis ĉeesti hodiaŭ, diris, ke li pretas transpreni la gvidadon se neniu alia kandidato prezentiĝus.

Nia retejo, rekonstruita per WordPress, funkcias, sed ĝi ne estas tre ofte ĝisdatigata, vizitata aŭ uzata. Ni bezonas reviziti tion.

Lastjare, ni aliĝis al la interasocia membrec-sistemo starigita de Espéranto-France. Tamen, ĉi tiu sistemo foje estas iom kompleksa, kaj iuj membroj havis malfacilaĵojn uzi ĝin. Ĉi tiu sistemo estas grava por la tuta movado. Ĝi permesas al ni efektivigi tutan gamon da komunaj agadoj, kiel ekzemple havi lokon en Parizo ĉe Rue de la Cerisaie, pagi la oficejon de Saïd, eldoni la revuon kaj organizi kongresojn. Isabelle N. donos al ni detalojn pri la diskutoj, kiuj okazis dum la Komitato-kunvenoj.

La sekva nacia kongreso okazos fine de majo en Hérouville-Saint-Clair, en la antaŭurboj de Caen. La monda kongreso okazos en Graz, Aŭstrio. Venontjare, ĝi estos en Melburno, Aŭstralio.

La revuo "Le Monde de l'espéranto", kiu ne estis publikigita dum jaro, nun havas novan redakcian komitaton gvidatan de Céline Bernard, kaj numero aperos fine de aprilo. Espéranto-Aktiv, dumonata reta publikaĵo, nun denove aperas regule. Ni bezonas sendi al ili mallongajn raportojn pri niaj agadoj en la regiono Limousin.

Ni bezonas ĝisdatigi niajn prezentajn materialojn pri Esperanto. Isabelle kaj Cathy sendis kelkajn interesajn sugestojn.

Jen ĉio, kion ni bezonas diskuti nun: pasintaj agadoj, venontaj agadoj, varbaj materialoj, la retejo, Babilemo, la sekvaj Babilkunvenoj (kun Périgueux kaj Châteauroux?). La statutoj. La kontribusistemo.

*Redaktis Isabelle Nicolas*

# 5.5. Fédération Espéranto-Nord (Nordfrancia Esperanto-Federacio)

## Regiona kunordigado

**Membraro.** La Federacio nombris entute 36 membrojn (kp. kun 47 membroj en 2022-2023):

- Amieno: 2; Araso: 16; Lillo: 12;
- individuoj-membroj: 7.

Cetere iniciatoj kaj rondoj ekzistas ankaŭ en Dunkirko kaj Kalezo.
**Federaciaj kunsidoj.** Kunvenis la federacia ĝenerala asembleo la 8an de decembro 2024 en la junulargastejo de Lillo.
**Rilato kun UFE.** Unue Claire Divoy kaj poste Xavier Dewidehem reprezentis la Nordfrancian Federacion en la komitato de UFE.

## Informado kaj komunikado

La Federacio komunikas per 3 informiloj (kaj retpoŝtaj mesaĝoj):

- La bulteno *Norda Kuriero*;
- La retejo: www.nordafrancio.fr kaj www.esperanto-hautsdefrance.fr
- La paĝoj en la sociaj retoj Facebook kaj Instagram.

**Informado en diversaj medioj**: Michel Dechy prezentis Esperanton en bazlernejoj kaj liceo en Villeneuve-d'Ascq, kaj informis pri Esperanto dum la foiro pri asocioj en Villeneuve-d'Ascq kaj en la bildrakonta festivalo en Lys-lez-Lannoy.

**Kursoj kaj staĝoj.** Diversajn kursojn organizis la kluboj (lernjaro 2024-2025):

- Amieno: ne estas kurso, sed homoj renkontiĝas regule por praktiki la lingvon;
- Araso: kurso por 7-9 homoj (komencantoj kaj progresantoj, komuna instruado kaj paroligaj kursoj);
- Bersée: kurso por komencantoj kaj progresantoj;
- Lillo: 3 komencantoj kaj 5 progresantoj en la t.n. 60a Domo; 3 lernantoj en la Universitato pri Libera Tempo.

## Kulturo kaj aranĝoj

Pluraj federacianoj partoprenis en internaciaj renkontiĝoj: en la Universala Kongreso en Brno (Ĉekio), en studsemajnfino en Ipro (Belgio).
La Lilla klubo gastigis la nordfrancian Zamenof-feston dum la 8a de decembro 2024 en la junulargastejo de Lillo. Dum la distra posttagmeza programo Xavier Dewidehem gvidis kvizon pri la historio de Zamenhof kaj de la nordfrancia Esperanto-movado. La Arasa klubo kaj Michel Dechy kantigis la ĉeestantaron.
Dek kvin esperantistoj el Norda Francio partoprenis la jarkunvenon de FKEA (Franca Katolika Esperanta Asocio) en Parizo.

*Redaktis Katja Boen*

# 5.6. Fédération Espéranto-France-Est (Orientfrancio)

La ĝenerala membrokunveno de Esperanto France-Est okazis la 25-an de majo 2025 en la libertempejo

ADEPA en Vigy (57640), kadre de la regiona staĝo de Esperanto-France-Est, kunorganizata de la grupo de Thionville kaj la landa asocio SAT-AMIKARO. Partoprenis ankaŭ niaj germanlingvaj geamikoj de BAVELO (Badenvirtemberga Esperantoligo) (35+33 partoprenantoj, entute).
Ĉi-jare membroj de la asocio denove prezentis la internacian lingvon dum diversaj aranĝoj en Raon-aux-Bois, Fontenoy-la Joûte, Nancy kaj Colmar.
La grupo de Nancy denove organizis unutagan Esperanto-kurson (Bunta Tago) ĉe la M.J.C. Desforges la 22-03-2025 (17 partoprenantoj.)
De la 17-a ĝis la 19-a de oktobro 2025 niaj membroj partoprenis la komunan kurson organizitan de niaj esperantistaj geamikoj el trans la Rejno de BAVELO (Badenvirtemberga Esperanto-Asocio) en Beilstein.
Ili ankaŭ partoprenis en la "Kultura semajnfino" organizita en Homburg de la 4-a ĝis la 6-a de julio de niaj sarlanda esperantistaj amikoj de Sarlanda Esperantyo-Ligo)
Sekve de la invito de nia membro Gilbert STAMMBACH, la prezidanto, la sekretario kaj la kasisto vizitis diversajn kunvenejojn en la bela valo La Plaine en Vogezoj, ĉe la bordo de la lago Pierre Percée. Bedaŭrinde la loĝkondiĉoj ne povis konveni al niaj membroj. Post tio S-ro Grossmann kaj Edmond LUDWIG konsentis organizi la printempan kurson en Alzaco, de la 16-a ĝis la 19-a de aprilo 2026 ĉe Rimlishof apud 68530 Buhl.
Esperanto France-Est daŭre eldonas (cifereca kaj papera versio) sian koloran bultenon LA INFORMILO (Abonoj LA INFORMILO Papera versio: 50 Cifereca versio: 12).
Membroj de la federacio: 27 Membroj de Esperanto-France + Esperanto France-Est: 37
Esperanto France-Est ankaŭ administras la retejon site **esperanto.est.free.fr** (André GROSSMANN) kaj provizas librovendejan servon kun 700 titoloj (Jean-Luc THIBIAS).
La sekretario: Edmond LUDWIG La prezidanto: Jean-Luc THIBIAS

*Raportis Edmond LUDWIG/Jean-Luc THIBIAS*

## AGADRAPORTOJ DE LA GRUPOJ Espéranto France-Est

**METZ**

La klubanoj de Metzo renkontighas chiuj vendredo por babiladi pri diversaj temoj.
Pasintjare, ni komencis traduki albomon de Tincjo : la sep kristalaj globoj.
Hungara viro venis kaj donis kelkakn kursojn.

*Redaktis Brigitte Guindolette*

**Mulhouse-Espéranto 2025**

La Ĝenerala Membro-Kunveno de Mulhouse-Espéranto okazis en Saint-Louis en la restoracio Nagoya Sushi la 25an de februaro 2025.
La agado estis sufiĉe limigita en 2025. Pro la altaj kotizoj ĉe Espace 110 en Illzach, André Grossmann ne plu gvidis Esperanto-kursojn.
Indas rimarki, ke en decembro 2024, la grupo partoprenis la Zamenhof-Feston en Bazelo kun niaj svisaj amikoj.
La jaro komenciĝis en la hejmo de nia prezidanto André Grossmann, kie ni ĝuis tri-reĝajn kukojn, trinkis cidron, sukojn kaj vinojn.
En 2025 la agado estis ĉefe limigita al kunvenoj de niaj membroj la lastan mardon de ĉiu monato, ĉu en Rixheim (ĉe la restoracio "Le Neuf") ĉu en la restoracio Nagoya Sushi en Saint-Louis, tre proksime al la svisa limo. Tiel, niaj svisaj amikoj povas aliĝi al ni preskaŭ tuj kiam ili eliras el la tramo en Bazelo. Bedaŭrinde, unu el iliaj membroj, s-ro Hans-Werner Grossmann, forpasis tiun jaron.
Pluraj ME-membroj vizitis la ekspozicion de te-etikedaj mozaikoj de Odette Behra en Masevaux, kie ŝi ankaŭ profitis la okazon por paroli pri Esperanto al la vizitantoj. Pluraj membroj ĉeestis la internacian renkontiĝon de "Mediteranea Esperanto-semajno" (Les Issambres).
Ĉar multaj ME-membroj ankaŭ estas membroj d'Espéranto-France Est, ili ĉeestis la regionan franc-germanan staĝon en Vigy (Mozelo) en kunlaboro kun la asocio SAT-AMIKARO.
Printempe pluraj membroj de ME partoprenis en la AMIKA TAGO en Stauffen organizita de la grupo de Freiburg.
Dankon al Bernard Behra, kiu ankaŭ estas membro de la grupo "Belfort Franche-Comté". Membroj de tiu grupo foje partoprenas niajn renkontiĝojn.
Denove, Michel BASSO kaj Edmond LUDWIG gastigis budon dum la unua semajnfino de majo 2025 en Colmar ĉe la "Champ de Mars" dum la internacia festivalo de la asocio "D'ici et d'ailleurs", kie multaj homoj ricevis informojn pri Esperanto. Ĉiuj tiuj eventoj estas menciitaj en la bulteno de SRK (Sudrejna Kuriero) -

verkita de nia prezidanto, André GROSSMANN - komuna bulteno por ME kaj la Bazela Grupo.
Ĉi-jare ni ankaŭ havis la plezuron de pluraj konversacioj kun ĉina esperantistino, SANOZA, kiu loĝis ĉe nia prezidanto. Ĉiuj niaj membroj povas trovi informojn en la retejo http://mulhouse.esperanto.free.fr/, kiun administras nia prezidanto.
Edmond LUDWIG, Sekretario

**Nancy 54 en 2025**

En 2025, la grupo de Nancy daŭrigis sian aktivadon kaj post antaŭa jaro iom malkuraĝiga, iom post iom revigliĝis.

- **KURSOJ** : daŭre en la junuldomo Desforges, ĉiun merkredon je la 19a, Novaĵo ĉi jare : anstataŭ fari komunan kunvenon ĉiun semajnon, ni decidis adopti 4-semajnan ciklon, 1a kaj 3a semajno : kurso por komencantoj, 2a semajno : paroliga kurso por ĉiuj, 4a semajno : tema vespero (prelegeto, ludoj, festado,,,)
 al la elementa kurso aliĝis unusola lernantino, kiu rezignis en printempo.
 Post la someraj ferioj aliĝis nova komencantino.

Januare restis nur 4 nekomencantoj, sed fine de la jaro aldoniĝis du pasintaj esperantistoj, kiuj rekontaktis la movadon.

Tiel ke fine de la jaro la grupo atingis 8 membrojn.

- **RETEJO** : esperanto-nancy,fr kreita de Gisèle Bertapelle estis savita, Ni provis plu ĝisdatigi ĝin. Tio daùre permesas alvenigi novajn membrojn, kiuj lernis per la reto aŭ tranlokiĝis al Nancio.

- **BUNTA TAGO** : la grupo organizis unu la 22an de marto, Venis 17 samideanoj de departementoj 54,55,57,88, 70 kaj de Trier (Germanio).

- **PARTOPRENO EN REGIONAJN EVENTOJN**: membroj de la grupo aliĝis kaj foje aktive partoprenis en la semajfinoj de Vigy (23/25aj-05), Homburg (4/6aj-07), Beilstein (17/19aj-10) , en la amika tago de Staufen (14a-06), en la Paralela Universo en Trier (16a-08), en la Zamenhoffestoj de Luksemburgo (13a-12) kaj Freiburg (14a-12),
- **PREZENTO DE ESPERANTO** : pluraj grupanoj kunprizorgis esperanto-budon en Fontenoy la Joûte (« librovilaĝo ») la 17an-08), Nancy (festo de asocioj, la 27an-09), Raon-aux-Bois (Festi la Vida la 28an-09).

Dankon al Micheline pro la librotenado, Liliane pro la sekretariado, Pablo pro la diversaj prelegetoj, Zia pro la eklernado, Lucile kaj Lucas pro la jarfina (re)aliĝado !

*Redaktis Jeau-Luc Thibias*

### Esperanto- Strasburgo

- **Komitatkunsidoj**
  Krom la kunsidoj okaze de la "kulturaj vesperoj" la komitato kunsidis la 21-an de septembro 2025 ĉe Bruno.

- **Konsciigo**

  - La 21an de februaro Bruno prezentis esperanton en la salono "les Pot'irons" de la asocio Arche en Strasburgo
  - Bernardo prezentis nian lingvon en bazlerneja klaso (École Schumann, Strasburgo) la 13an de majo, kaj en mezlerneja klaso (Lycée Marguerite Yourcenar, Erstein) la 20an de majo.
  - La klubanoj starigis tendon kun flagoj por pikniki en "Ĝardeno de Ambaŭ Bordoj" vespere la 28an de junio 2025.
  - La 13-14ajn de septembro 2025 dek klubanoj deĵoris ĉe budo okaze de la foiro "Village des Associations" en Parko "de la Citadelle" por prezenti nian lingvon kaj niajn agadojn. Ni povis disdoni la 2026-kalendaretojn de Espéranto-France.

  - La retpaĝoj de la asocio estas ofte ĝisdatigitaj por prezenti la klubajn agadojn. Baldaŭ, dank'al Emmanuelle Richard tutnovaj retpaĝoj estos disponeblaj. pro tio ni interrete renkontiĝis la 23an de septembro 2025.

- **Klerigado, kursoj**

En la « Maison Citoyenne » ĉiulunde - krom lernejaj ferioj – okazas kursoj por komencantoj kaj progresantoj.
De la 14a de oktobro 2024 ĝis la 26a de majo 2025 entute okazis 29 kursoj, kiuj daŭris du horojn aŭ unu kaj duono horo. Bernardo instruis al 1 komencanto kaj 2 progresantoj, (Luiza, Arno, Oreljo) per la libretoj "Metodo 11" kaj "Metodo 12", kaj aliaj aĵoj.
La 12an de majo, ankaŭ Pilippe kaj Maggy el Marsejlo vizitis la kurson kaj partoprenis kiel spertaj instruistoj. La 19an de majo Sara kaj Jean el Aŭstralio ankaŭ partoprenis la kurson kiel komencinto kaj progresanto.

- **Komunumo : "Kulturaj vesperoj" en "Maison Citoyenne".** La renkontiĝoj okazis:

    - la 14an de oktobro,
    - la 25an de novembro, Josua el Nov-Zelando prelegis pri sia lando kaj ĝiaj historio kaj popoloj
    - la 16an de decembro 2024 Ĵoel kaj Lora prelegis pri siaj renkontoj en Koreio kaj Japanio. Ni ankaŭ akceptis Andreas'n el Rastatt-Germanio.
    - la 13an de januaro 2025, ni festis la novan jaron manĝante reĝkukon kaj trinkante ŝaŭmtrinkaĵojn.
    - la 10an de februaro, ni cerbumis dank'al Lora, kiu prezentis enigmojn de Marjorie Boulton, kaj ni ludis dank'al Karlo, kiu organizis la ludon "kiuj estas la volapukistoj ?".
    - la 10an de marto, Bernardo prezentis la vojaĝon kaj la verkojn de la esperantisto Lucien Péraire.
    - La 28an de aprilo Karlo prezentis la romanon "la vojo returne" (Der Weg zurück) de Erich Maria Remarque, kaj Mikelo Basso prezentis sian vojaĝon kaj siajn renkontojn en Togolando.
    - La 19an de majo ni akceptis Sara'n kaj Jean'n el Aŭstralio, kiuj prelegis pri sia farmbieno kaj pri sia lando.

*Redaktis*

## ASSOCIATION ESPERANTO THIONVILLE

**1) Ĝenerala kunveno :**
La 13an de septembro 2025 okazis ĝenerala kunveno en la Domo de Asocioj Raymond Queneau en Thionville kun 14 membroj. Sekvis komuna tagmanĝo en proksima restoracio.

**2) Monataj kunvenoj en la Domo de Asocioj Raymond Queneau en Thionville :**
Naŭ kunvenoj okazis sabate matene. Dum tiuj kunvenoj ni interŝanĝis informojn pri venontaj internaciaj kaj regionaj esperantistaj eventoj. Ni praktikis Esperanton pri diversaj temoj. En ĉiu kunveno okazis prelegoj. Daniel Raoult prezentis plurajn temojn : Fortikaĵoj de monto Chaberton (Sudaj Alpoj), Alain Fournier, Majoto, virinaj strikoj en Bretonio, la malbonŝancoj de la muŝo Psikoda, kaj piedmigrado de Gorze al Novéant. Werner Fabert prezentis Kipron. Bruno Henry prezentis la funkciadon de BigBlueButton (videokonferenca sistemo). Ni diskutis kaj preparis la kongreson de SAT-Amikaro kaj la Esperanto-Staĝon en Vigy fine de majo 2025. René Triolle vizitis nin en la februara kunveno. En septembro 2025 okazis ĝenerala kunveno en Thionville kun 14 membroj. Sekvis komuna tagmanĝo en proksima restoracio.

**3) Esperanto-kursoj por komencantoj kaj progresantoj en Thionville :**
De septembro 2024 ĝis junio 2025, Antonio instruis Esperanton al 4 komencantoj ĉiusabate posttagmeze kaj Bruno gvidis kursojn por progresintoj dufoje monate sabate, kun 2 ĝis 3 personoj. Bedaŭrinde ni ne sukcesis varbi komencantojn en septembro 2025. Sed la komencintoj daŭrigas la lernadon en la kurso por progresantoj kun Bruno, kiu uzas la novan kurslibron « Pri kio temas ? ». En tiu kurso partoprenas 6 homoj.

**4) Esperanto-tagoj :**

La 5-a “Bunta Esperanto-Tago” okazis en Nancy la 22-an de marto 2025 kun kursoj por komencantoj kaj progresintoj. Por praktikantaj esperantistoj okazis etaj prelegoj :

- La babilantaj biskvitoj (Liliane Bersweiler),

- Rigardo al Afganio en 1972/1974 (Edgar De Zilah),
- La natura metodo por lerni fremdajn lingvojn – apliko por Esperanto (Pablo Andres-Domenech),
- Kapoj de sardinoj (Daniel Raoult),
- Prezentado de novaj libroj (Jean-Luc Thibias).

Vespere ni vizitis ekspozicion en la kastelo de Charmois pri Vandoeuvre en la epoko de Napoleono.

**5) Staĝo kaj kongreso en Vigy 2025:**

De la 23-a ĝis la 27-a de majo 2025, en la ĉarma vilaĝo Vigy proksime de Metz, okazis du gravaj eventoj organizitaj de nia asocio :

- La 77-a Kongreso de SAT-Amikaro

- La 89-a Regiona Esperanto-Staĝo de Esperanto France-Est (EFE)

68 esperantistoj el Francio, Germanio, Luksemburgio, Belgio, Benino, Kongo Madagaskaro kaj Senegalio, kunvenis. Ni proponis prelegojn kaj tre riĉan kulturan programon. Reprezentantoj de SAT-Amikaro, de la Luksemburga Esperanto-Asocio, de la regionaj federacioj BAVELO (Baden-Virtembergo), Sarlanda Esperanto-Ligo kaj Esperanto France-Est anoncis siajn venontajn kunvenojn sen landlimoj.

La lasta tago inkludis virtualan renkonton kun afrikaj esperantistoj el Benino, Senegalo, Madagaskaro kaj la Demokratia Respubliko Kongo. Ili prezentis siajn projektojn, ofte faritajn kun malmultaj rimedoj sed granda sindediĉo.

Sabate matene, Bernard gvidis grupon de pli ol 30 homoj tra la galerioj de la plej grava fortikaĵo " Hackenberg" sur la Maginot-linio, defendosistemo konstruita de Francio inter 1928 kaj 1940.

Dimanĉe posttagmeze Catherine gvidis dekon da homoj por viziti la urbon Metz kaj ĝian katedralon.

Okazis Esperanto-kursoj por komencantoj kaj progresintoj kaj prelegoj pri scienco, kulturo kaj sociaj temoj :

- La rekonstrua laboro de la katedralo Notre-Dame de Paris (materialoj : ligno, plumbo),

- La mirindaĵoj de la spac-teleskopo JWST,
- Prezento de lerniloj por infanoj « Pedagogia Valizeto »,
- Historia prelego : "Sur la spuroj de J. Morris, esperantisto, anarkiisto kaj naturisto, pioniro de ekologio kaj malkreskismo".

Du progresintaj kursanoj, Daniel kaj David el nia asocio, sukcesis trapasi la unuan gradan ekzamenon de Franca Esperanto Instituto (FEI). Gratulon al ili !

La vesperoj estis dediĉitaj al muziko :

- La vira koruso "La Voĉoj de la Oriento" kantis tre talentplene en pli ol dek lingvoj, inkluzive "Bella Ciao" Ho ! Belulin 'en Esperanto,

- La Revolucia Koruso, plejparte junuloj, kun granda entuziasmo prezentis kantojn en diversaj lingvoj de la socia movado, ankaŭ en Esperanto. Ili lernis la lingvon por tiu okazo kaj kantis perfekte. Post la kantado la korusanoj interŝanĝis amike kun la publiko.

La kongreso estis ankaŭ okazo por kunlabori kun aliaj asocioj. Dum la laboraj sesioj de SAT-Amikaro, estis diskutitaj financaj defioj kaj planitaj estontaj agadoj. La respondeculo de la EFE-libroservo prezentis la lastajn eldonojn. SAT-Amikaro ankaŭ prezentis librojn kaj eldonaĵojn. La interŝanĝoj kaj amikeco en tia paca loko lasis neforgeseblan memoron al ĉiuj partoprenantoj. Multaj esprimis sian sinceran dankon al nia asocio Esperanto-Thionville dum la amikeca glaso. La sukceso de la Vigy-kongreso nutras esperon pri daŭra vigleco de la esperanta movado en la regiono kaj en la mondo.

**6) Zamenhof Festo en Luksemburgo 13/12/2025**

La Zamenhof-Festo estis vere internacia en bona kaj agrabla etoso. Ni estis chirkaŭ 20 partoprenantoj, el klubo de Luksemburgo, Thionville, Metz, Nancy kaj Konz (DE). Matene ni promenis tra historiaj partoj de la

ĉefurbo. Ĉiĉeronis Brian Moon. Tagmeze ni manĝis bongustajn italajn pladojn en la restoracio Porta Nova. Post la manĝo István ERTL prezentis novajn eldonitajn librojn kaj Jean-Luc Thibias kelkajn librojn el la libroservo de "Esperanto France Est". Venontjare la asocio Esperanto-Thionville organizos ĝin.

**7) Kelkaj el niaj membroj partoprenis en :**

- La 73-a Kultura Semajnfino de Sarlanda Esperanto-Ligo de la 08/11 ĝis 10/11/2024 en Homburgo (Germanio),
- La 89-a Regiona Esperanto-Staĝo de la 23/05 ĝis 25/02/2025 en Vigy,
- La 77-a Kongreso de SAT-Amikaro de la 23/05 ĝis 27/02/2025 en Vigy,
- La 74-a Kultura Semajnfino de Sarlanda Esperanto-Ligo de la 04/07 ĝis 06/07/2025 en Homburgo (Germanio),
- La 77-a Universala Kongreso de Esperanto de la 26/07 ĝis 02/08/2025 en Brno (Ĉeĥio),
- La 110-a Kongreso de SAT de la 09/08 ĝis 16/08/2025 en Kastelo Greziljono en Baugé en Anjou.

*Raportis Bruno HENRY*

# 5.7. Fédération Espéranto-Paris-Île-de-France (Parizo-Francilio)

**Administrado**

La Ĝenerala Asembleo de Esperanto Parizo-Francilio (EPF) okazis la 23/03/2025. Nova komitato de 11 personoj estis elektita de la membroj. La nova komitato elektis en si mem novan estraron: Aleks Kadar, prezidanto - Pierre Gauthier, kasisto kaj reprezentanto ĉe Esperanto-France - Laure Patas d'Illiers, sekretario - Viktoro Simonnet, vicsekretario. La komitato kunsidis 5-foje inter marto 2025 kaj februaro 2026.

La komitatanoj zorgas pri anoncoj de la diversaj agadoj de EPF laŭlonge de la jaro per pli ol dek kanaloj (retejoj, sociaj retoj, dissendolistoj, ktp).

**Agadoj**

Esperanto Parizo-Francilio (EPF) organizis aŭ partoprenis plurajn eventojn dum la periodo.

Okazis regulaj renkontiĝoj : 11 kulturaj vesperoj, 10 esperanto-kafejoj ĉiufoje en malsama loko, 8 junularaj babilrondoj (kun JEFO), 3 ĝemelurbaj retaj babilrondoj kunorganizitaj kun la asocio de Romo (la ĝemela urbo de Parizo), 5 sabataj posttagmezaj diskutrondoj. Al tiuj oni devas aldoni unuopajn eventojn : posttagmeza festo por bonvenigi novulojn kaj festi la 125-an jariĝon de nia asocio, la reĝkuka festo kaj la Zamfesto kunorganizita kun SAT-Amikaro kaj la fervojistoj.

EPF informis la publikon pri esperanto en diversaj eventoj : malfermaj pordoj en la sidejo, Foiro pri matematikaj ludoj, Festo de asocioj de Paris Centre, kaj provizis homfortojn al la budoj de Espéranto-France dum la Homara Festo kaj Salon européen de l'éducation.

Finfine, EPF proponas du esperanto-kursojn : unu por komencantoj, unu por altniveluloj.

La kompletan agadraporton 2025 de EPF eblas konsulti en: https://esperanto.paris/membro-kunvenoj

*Raportis Pierre Gauthier*

# 5.8. Fédération Espéranto-Provence (Provenco)

**Gazette**

Quatre numéros de la Gazette ont été publiés durant l'année.
Responsable de la rédaction : Pascal Panarotto - Mise en page : Marie-Hélène Bertucelli - Support informatique : Frédéric Gilles.
Il est regretté un manque de contributeurs en dehors de Marseille.

**Accueil d'espérantistes cubains**

Des espérantistes cubains ont été accueillis chez Renée Triolle, à l'issue d'une tournée en France et en Europe. Nous regrettons qu'Espéranto France n'organise pas de tournées de conférences.

**Stage de La Garde**

Le stage organisé depuis trois ans au domaine de Massacan s'est tenu comme les années précédentes avec 3 niveaux de cours (Renée Triolle, Pascal Vilain et Jean Pierre Cavelan), une exposition de photos sur le voyage en vélo de Lucien Peraire en Asie et une soirée culturelle.
19 participants étaient présents lors de l'édition 2025. Le trésorier souligne toutefois un effectif insuffisant pour assurer un équilibre budgétaire satisfaisant.

**Plantation de l'arbre de l'espéranto**

Un arbre de l'espéranto a été planté aux Pennes-Mirabeau, en présence de nombreux participants : élus départementaux et municipaux, adhérents et sympathisants. Cette plantation a été suivie d'un apéritif. Le brachychiton, trône désormais dans les jardins de la mairie.

**Mediteranea Esperanto-Semajno (MES)**

La rencontre annuelle s'est déroulée comme chaque année aux Issambres. Nous avons accueilli 53 participants en 2025. répartition des cours sur 3 niveaux : Pawel sur panorama de la littérature espérantiste, Manfred Westmeyer sur l'écologie et Rodica Todor pour les débutants

## Activités des clubs et antennes

**Marseille**

Cours tous les mardis, séances de conversation les jeudis et cafés linguistiques le premier jeudi du mois, désormais organisé à Vidéodrome 2.
Le club a également organisé d'autres évènements (galette des rois, rencontres, Zamenhofa festo) ainsi que les examens de FEI.

**Lorgues**

Cours les derniers jeudis du mois.
Un événement organisé à Correns a permis de présenter l'espéranto à un large public, avec un spectacle animé par JoMo.

**Saint-Raphaël**

Cours tous les mercredis.
Une nouvelle adhérente de 90 ans a rejoint le club.
Deux repas annuels sont organisés avec les adhérents.

**La Ciotat**

Changement de lieu pour les cours et organisation de diverses activités autour de l'espéranto.
Interventions sur les événements importants de l'année : journée de la femme, journée, européenne des

langues .....

**Le Castellet**

Organisation de cours. Participation au forum des associations.

**Avignon**

Deux nouvelles personnes assurent désormais l'organisation des cours.

**Guillaumes**

Organisation d'un café linguistique et succès du Festival citoyen 2025.
La prochaine édition aura lieu en septembre 2026.

**Gap**

Monique Arnaud informe l'assemblée que le club de Gap a cessé ses activités, bien que les espérantistes locaux restent actifs.

*Raportis Thierry Spanjaard*

# 5.9. Fédération Espérantoccitanie

**Créée le 18 novembre 2023 à Montpellier,** la fédération Espérantoccitanie reprend le flambeau des associations Espéranto Midi-Pyrénées et Espéranto Languedoc-Roussillon. sur le territoire de la région administrative Occitanie Pyrénées Méditerranée.

**La fédération a pour buts de :**
- favoriser la promotion, l'enseignement et l'usage de la langue internationale espéranto ;
- sensibiliser aux droits, à la justice et à la diversité linguistiques ;
- représenter, sur le plan local, le mouvement espérantiste auprès de divers pouvoirs publics et organismes privés.

Pour atteindre ces buts, la fédération coordonne et soutient les activités des personnes ou associations du mouvement espérantophone dans la région Occitanie
En 2024, la fédération Occitanie a soutenu financièrement l'oganisation d'une journée de l'Esperanto à Lodève et la création d'une association locale à Narbonne.
Les informations se trouvent sur le site internet : https://occeo.net/

**Les associations-membres:**
– Centre Culturel Espéranto de Toulouse.
– Eurokka
– Centre Culturel Espéranto de Montpellier
– Esperanto-Tarn
– CEEA (Ariège)

Ni ne ricevis raporton pri la agado.

# 5.10. Federacio Normandio

Post la morto de Yves Nicolas fine de 2022 kaj la malfondiĝo de la asocio Normandie-Espéranto en marto 2024, la normanda Esperanto-movado alfrontas malfacilaĵojn.
Hérouville-Espéranto nun estas la ununura aktiva klubo en la regiono Normandio.
Ĝi strebas konservi la heredaĵon de la normanda asocio kaj plifortigi ligojn kun la izolitaj esperantistoj de 5 departementoj de la regiono.

Tiucele, la klubo:

- daŭre verkas kaj dissendas la Normanda-n Esperanto-Bulteno-n, nun en cifereca formato. Ĝi ciferecigis kaj disponigis interrete la arĥivojn de la revuo (Temas 310 numeroj de Verda Stelo kaj de la Normanda Espéranto-Bulteno, eldonitaj inter 1912 kaj 2026, haveblas).

Kiel la regiona asocio tradicie faris ĉiujare, ĝi organizis regionan kunvenon kune kun la asocio Mémoire & Patrimoine – SMN. Ĉirkaŭ tridek homoj, esperantistoj aŭ ne ĉeestis; la kunveno omaĝis al la eksterlandaj laboristoj kiuj konstruis kaj funkciigis la Société Métallurgique de Normandie (Normandia Metalurgia Kompanio) en la pasinta jarcento kaj malkovrigis la tiaman Esperanto-klubon de la uzino.
En juinio 2025, la klubo decidis partopreni en la komuna kotizsistemo kun Espéranto-France.
Fine de 2025, aliĝis 31 homoj, el kiuj 7 loĝas ekster la departemento Calvados.
Ĉiun mardon (krom dum lernejaj ferioj, la klubo kunigas ĉirkaŭ dek kvin homoj ĉe la Domo de la Asocioj.
Du grupoj estis formitaj: la grupo por komencantoj kaj tiu por la komencintoj kaj la progresantoj.
En 2025, la klubo gastigis du eksterlandaj esperantistojn (el Ukrainio kaj Norvegio).
Sep klubanoj ĉeestis la nacian kongreson en Nantes. Tri partoprenis en la kongreso de UEA en Brno.
Ankaŭ kelkaj membroj partoprenis kiel privata persono en diversaj esperantistaj-aranĝoj (SES, kongreso de SAT-Amikaro, staĝoj en Greziljono, …)

En oktobro, la ĝenerala kunsido de la asocio favore respondis la peton de Espéranto-France organizi la nacian kongreson en 2026.

*Raportis Bertrand Verstraete*

# 5.11. Autres groupes

Jen la raporto de la grupo Amika Rondo (Bourg en Bresse):

La asocio Amika-rondo, sekvo de Espéranto Bourg-en-Bresse, estas membro de la interasocia kotizsistemo. En 2025, ĝi havis 16 anojn. La ses komitatanoj kunvenis kvin foje, ĉefe virtuale per Discord, kie ni kreis nian propran kanalon. Tiu virtuala rimedo pruvis esti taŭga, aparte kiam la malsamaj membroj loĝas en malproksimaj lokoj.

Ni uzas ĉefe Discord por interŝanĝi. Ni proponas du horarojn semajne por babiladi pri ĉiaj temoj: merkrede vespere je la 20a kaj sabate matene je la 9a. Ni devas nun pli bone komuniki pri tiuj ebloj, por ke pli da homoj, ekster niaj membroj, partoprenu.

Nia retpaĝaro estis tute starigita. Ĝi ekzistas en tri lingvoj (esperanta, franca kaj kartvela), sed nur la esperanta versio ricevas regulajn ĝisdatigojn. Unu ĉefa celo estis savi la valorajn arkivojn de la eksa asocio, ekzemple la registritajn radioelsendojn.

Fine de 2024, du el niaj junaj membroj konkursis en la 6a usona bona film-festivalo. Ilia filmo *Pasporta amo* ricevis honoran mencion.

Ekde pluraj jaroj, Emmanuel Desbrieres proponas aktivaĵon por lerni la esperantan en la liceo, kie li estas instruisto. Ĉi-jare, 40 liceanoj vojaĝis surbaze de la temo "Agademaj virinoj favore al la paco". Ili ĉeestis en Vieno, Triesto kaj Trento, kie ili ne nur vizitis monumentojn kaj muzeoj, sed precipe renkontis esperantistinojn kiuj agadis por la paco.

La 17an de majo, publika komunikaĵo pri tiu vojaĝo okazis en la salfarejo de Salins-les-Bains. Inter la ĉeestantoj estis la liceanoj, iliaj gepatroj, la direktorino de la liceo kaj la vicurbestro.

Indas noti ke tiu liceo afiŝas siajn novaĵojn ankaŭ en la esperanta lingvo en ĝia retpaĝaro.

Ĉi tiu projekto povis esti realigita danke al la subvencio (1000 €) de Espéranto-France kaj al donacoj de anoj de tiu nacia asocio.

Ĉi-jare nia semajnfina festokunveno okazis la 4an kaj la 5an de julio en la ĵurasa vilaĝo Villechantria, kune kun la membrokunveno de la asocio.

Festa tago okazis en Besain (Ĵuraso) dimanĉe la 21an de decembro. Ĉirkaŭ tridek homoj, precipe junuloj kiuj

lernis esperantan dank'al la kurso de Emmanuel, sin retrovis por festi kaj praktiki tiun lingvon.

Ni ne povas agadraporti pri tiu jaro 2025, sen mencii grava perdo por nia asocio. Nia delonga kaj ege aktiva amiko Michel Fontaine, forpasis en majo. Li eklernis la esperantan fine de la 90a jardeko kaj rapide fariĝis ege aktiva ano de Espéranto Bourg-en-Bresse, kaj poste de la Rodanalpa federacio. Li ĉiam provis uzi novajn kaj modernajn rimedojn por praktiki la lingvon. Li ekzemple uzis Skajpon, ekde la jaro 2004, por doni kursojn internaciskale. Li estis unu grava organizanto de la nacia kongreso 2007 en Bourg-en-Bresse. Poste, li vivis en Ĉinio dum pluraj jaroj kie li instruis al junaj infanoj la esperantan ĉiusamajne. Li restis ege aktiva ĝis la fino. Li tradukis plurajn librojn esperanten kune kun sia korea amikino Ana Sonĝanta.

*Raportis Régis Fabre*

# 6. Jaraj raportoj de la fakaj asocioj

## 6.1. Espéranto-Jeunes (JEFO)

Neniun raporton ni ricevis

## 6.2. ILEI-Francio

ILEI-Francio estas landa sekcio de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) kaj faka asocio de Espéranto-France, ankaŭ nomita *Groupe des Enseignants Espérantophones* (GEE), fondita en 1953.
En 2025 ILEI-Francio havas 38 membrojn laŭ IPR
– 22 kun reta servo,
– 15 kun papera servo,
– 1 dumviva,
laŭ aĝo:
– 0 ĝis 35 jaroj,
– 4 inter 36-50 jaroj,
– 4 inter 51-65 jaroj,
– 30 estas 66+ jaroj.

Estraro
– prezidanto, posteno vakas,
– Emmanuel Desbrières, vic-prezidanto pri mezlerneja agado, reprezentanto ĉe ILEI,
– Philippe Planchon, vic-prezidanto pri universitata agado,
– vic-prezidantoj pri bazlerneja agado, studenta agado, movada agado, vakas,
– Didier Janot, sekretario kaj sekciestro, reprezentanto ĉe ILEI kaj Espéranto-France,
– vakas unu reprezentanto ĉe ILEI.

Retpaĝo https://eventaservo.org/o/ILEI-Francio
Oni aliĝas al ILEI kaj ILEI-Francio per la aliĝilo de Espéranto-France
– 12,50€ kun reta servo de Internacia Pedagogia Revuo (IPR),
– 25€ kun papera servo.

**Lerneja agado**

**Lycée «Victor Considerant» en la urbo Salins-les-Bains (Jura)**
departemento Jura (Orienta parto de Francio), mezlernejo por 15-17 jaruloj.
Funkcias Esperanto-ateliero gvidata de Emmanuel DESBRIERES kiu raportas.
Dum lerneja jaro 2024-25 lerneja 44 gelernantoj kaj 4 instruistoj vojaĝis ĉirkaŭ Alpoj tra Esperantujo. Artikolo ĉe la oficiala lerneja retejo:

https://lc-vconsiderant-salins-les-bains.eclat-bfc.fr/actualites/voyage-de-l-atelier-esperanto-restitution-a-la-grande-saline-226075866.htm
Ekslernantoj aktivas :
– vojaĝo de 4 ekslernantinoj tra Eŭropo per Pasporta Servo dum somero 2024 kaj denove dum 2025.
Vidu :
https://fr.amika-rondo.eu/un-voyage-en-europe-par-pasporta-servo-vojago-en-europo-per-pasporta-servo/

– du nun estas komitatanoj de nia esperantista asocio: amika-rondo, kaj membroj de Esperanto-France kaj UEA.
Ekde septembre 2024 la oficiala retejo de la liceo enhavas esperantan version. Ekz.
https://lc-vconsiderant-salins-les-bains.eclat-bfc.fr/actualites/visite-a-la-grande-saline-267996705.htm

**Departemento Loiret**
Raportas Pierre DIEUMEGARD
Esperanto-Loiret ricevis oficialan departementan agnoskon de *Académie Orléans-Tours*, supera instanco pri edukado en la regiono (https://www.ac-orleans-tours.fr/relations-avec-les-associations-122438). Tio faciligas agadon en lernejoj.
=> Écoles « Louis PASTEUR » kaj « Henri POINCARE » en la urbo Orleano (6-10 jaruloj)
Prezento pri Esperanto al gelernantoj de la bazernejoj Louis Pasteur kaj Henri Poincaré (ĉirkaŭ 50 gelernantoj) okaze de la 2a Festivalo de la lingvoj en Orléans.
(vidu retejon de Linguafest'45 http://linguafest45.free.fr/index.php?perma=LF45_Festival2024 aŭ artikolo de Mag'Centre https://www.magcentre.fr/315782-les-langues-de-lorleanais-en-fete/)
=> Collège « La Providence » en la urbo Olivet (mezlernejo por 11-14 jaruloj)
Esperanto-kurso de oktobro ĝis decembro 2024 ĉiusekunmajne (2-4 gelernkunantoj)
=> Collège « Mary JACKSON » en la urbo Dadonville
Ekspozicio-prezento pri Esperanto + viva prezento (450 gelernantoj) okaze de la « Semajno pri lingvoj ».

**Collège « La Providence », la urbo Mesnil-Esnard apud Rouen (Normandio, okcidenta regiono apud Parizo)**
Raportas Céline LECESNE, Matthieu LECESNE kaj Pascal DUBOURG GLATIGNY
Prezento de Esperanto al mezlernejanojn de la 5e, 4e, 3e klasoj (12-14jaraĝaj) okaze de la tago « Civitanoj de la Mondo » (journée "Citoyens du Monde"). Entute 150-160 lernantoj en ses sesioj de 45 min kaj ekspozicio.

**Lycée «SAINT EXUPERY», urbo Marsejlo (Marseille) en Provenco, Regiono ĉe Maro Mediteraneo**

Interveno, laŭ invito al kunveno de studentoj de Ecole Centrale-Méditerranée (inĝeniera alt-lernejo) en Marsejlo, kiuj dum tri jaroj subtenas la studojn de lernejanoj de la liceo Saint-Exupéry en malfavoraj nordaj kvartaloj de Marsejlo. Unufoje jare, ili kunvenigas ĉiujn por prezento de diversaj asocioj (i.a Esperanto-Marseille) kaj posta kvizo (kun premioj) por kontroli ĉu ili atente aŭskultis la prezenton! (Marc GALLARDO kaj Rosy INAUDI preparis la demandojn kaj zorgis pri la prezento). Duan fojon ili invitis nin .

Raportis Renée TRIOLLE

**Universitata agado**
**École normale Supérieure (ENS) en Parizo**, altsupera lernejo kiu trejnas instruistoj pri sciencoj por supera edukado
De 10 jaroj Jesper Jacobsen gvidas Esperanto-kursojn kadre de elektebla fako (parto de oficiala programo). Okazas duhora semajna leciono. Unua semestro estas kurso por komencantoj de nivelo 0 ĝis A2 (averaĝe 12 lernantoj jare). Dua sesmetro estas kurso por progresantoj (per legado de originala literaturo kaj diskutado) de A2 ĝis B1/B2 (averaĝe 5 lernantoj jare al kiuj povas aldoniĝi lernantoj de aliaj universitatoj.

**Universitato Bordeaux Montaigne**
De 8 jaroj okazas nedeviga kurso de Esperanto por komencantoj kaj progresantoj kun 4 lernantoj. Nun instruas Canonica Elvezio. Unu ekslernanto de tiu universitato laboris dum du jaroj en la CO de UEA en Roterdamo.

**Universitato de Tours, Orléans kaj Poitiers**
Philippe Planchon plu organizas interlingvistikan kurson (*Linguistique de l'espéranto et des langues construites*) en Tours kaj parte hibride kun studentoj de Orléans, entute al 15 studentoj el kiuj 3 partoprenas en BIP-programo. Al tio aldoniĝas prezento de Esperanto en universitato de Poitiers al 30 aliaj studentoj kadre de kurso pri inventado de novaj lingvoj.

Retpaĝo https://eventaservo.org/o/ILEI-Francio

*Raportis Didier Janot*

# 6.3. TAKE (Tutmonda Asocio de konstruistoj esperantistaj)

Ni daŭrigas nian senlacan agadon, tio estas konatigi en la esperanto-medio nian asocion kaj ties revuon KONSTRUADO-kajero kaj instigi esperantistojn al legado de fakaj tekstoj. Jes, plian fojon, ni deziras substreki, ke nia internacia lingvo ESPERANTO utilas ne nur al turismaj aferoj, al homaj renkontiĝoj, sed ankaŭ al rilatoj sur sciencaj kaj teknikaj kampoj. Tial, estas utile, ke nia revuo aperu ankaŭ sur papero, por ke ĝi estu vidata de ne-esperantistoj. La misinformoj aŭ kontraŭjuĝoj plu ekzistas koncerne nian lingvon. Vidi propra-okule kio ekzistas, jen bona sperto!

**Diversaj partoprenoj antaŭ kongreso de Brno**

Dum la jaro 2025, ni havis plurajn okazojn prezenti la prelegon pri Nia Damo de Parizo, kaj ties rekonstruadon, je pluraj eventoj:

- 1/ inter-reta renkonto de la **Kluboj Londono- Antverpeno**: Okazis je la 7a/02/ 2025 kun ĉeesto de pli ol 60 personoj.
- 2/ dum la regiona renkonto en **Vigy** apud urbo Metz (23/05 ĝis 26/05/2025) kun-organizita de EFE (Franca orienta esperanto asocio) kaj BAVELo (Bad-vurtemberga esperanta asocio) samtempe kun la nacia kongreso de SAT-Amikaro (franc-lingvia esperanta-asocio)
- En la sama kongreso estis prezentita prelego pri starigo de **trinkebla akvo-reto** en Kalima (urbeto de Respubliko Demokrata de Kongo) Projekto long-daŭra (pli ol 10 jaroj), kiun nia asocio respegulis en sia revuo.

**Eŭropa kongreso en BRNO**

- Fine de julio 2025 (de la 26a/07 ĝis la 2a/08) okazis la **UK: Universala Kongreso en BRNO**-dua plej grava urbo de Ĉeĥa Respubliko. Kiel kutime, bunta kaj diversega programo: tute ne eblis partopreni ĉiujn interesajn eventojn, ofte organizitajn samtempe, (foje 6 en unu horo!) Tamen, TAKE partoprenis sabaton post-tagmeze en "la MOVADA FOIRO" dum kiu esperantaj asocioj (45 entute!) klopodas prezenti siajn agadojn!
- En la sekvanta lundo, je la 9a la kongresantoj povis elekti inter 5 eventoj, [Laŭplane okazis **15 prelegoj dum 3 blokoj**, po 5 prelegoj en ĉiu tempobloko !] Meze de tiuj, nia prezentado per Power point pri la **rekonstruado de la katedralo de Nia Damo de Parizo**.

Ni havis la bonan surprizon, ke ĉeestis pli malpli 40 personoj. Ĉar la ĉambro estis malgranda, la aŭskult-ebleco estis bona kaj ebligis interŝanĝoj sen mikrofono, precipe pri teknikaj terminoj.

Bedaŭrinde, la prelego ne estis registrita.

- Notindas (vidu tabelon supre dekstre) ke tuj poste okazis kunveno pri R. D. Kongo, lando kie TAKE havas multajn kontaktojn en la regionoj Norda kaj Suda Kivu-oj kaj finance apogis studenton. Sed, malfeliĉe la regiono estas en milita situacio pro okupateco far ruanda milico M23 kaj tio bremsas projektojn.
- Post tiu prelego, nia sekretario estis longe intervjuita en Podkasto https://kern.punkto.info/

https://kern.punkto.info/2025/10/06/kp232-la-rekonstruado-de-nia-damo-de-parizo/

- **TAKE en Togolando**. La prezidanto de nia asocio TAKE vizitis tiun landon kaj donacis nome de nia asocio meblojn por lernejo. Kadre de humanitara projekto por lernejoj, la franca grupo de la asocio Novissi de Strasburgo, kie estis unu esperantisto, Michel Basso, vojaĝis en februaro por alporti helpojn al 4 lernejoj apud Lomeo : Oni liveris 65 benkojn al lernejo de Apessito kaj Mission-Tové , plusôj al Instituto de blinduloj de Togoville kaj 500 skribilojn kun vorto Esperanto al Instituto Zamenhof, por ĉiuj lernantoj kaj mondonaco de 200 euroj.

*Rapportis Pierre Grollemund (sekretario)*

# 6.4. FKEA ( Franca Katolika Esperanto-Asocio)

Ekskurso en Parizo

Okaze de ĝia ĝenerala asembleo, FKEA (Franca Katolika Esperanta Asocio) organizis plurajn eventojn en Parizo kaj en Évry la unuan semajnfinon de februaro. Dek kvin esperantistoj el nia regiono partoprenis la renkonton. La aliaj kongresetanoj devenas de Orée d'Anjou (apud Nanto), Bretonujo, Parizo, Strasburgo kaj de Saint-Pierre-Chérignat (apud Limoges). Parto de la grupo loĝis en malgranda dominikana konvento en Évry, sed la plej gravaj programeroj okazis en Parizo. Sabate matene, Dr Christian Lavarenne prelegis pri esperanto kaj ekumenismo. Li ĉefe parolis pri litova esperantista pastro Dombrovski kiu multe klopodis por la unueco de la kristanoj kaj teorie elpensis ĝin en tempo dum kiu la pensmaniero estis kontraŭa. Tial li estas pioniro. La preleganto finis dirante kelkajn vortojn pri alia esperantista pastro, Joseph Metzger, beatigita lastan decembron kiu ankaŭ multe klopodis por la unueco de la kristanoj kvardek jaroj poste. La prelego okazis en ISTINA, institucio fundita de la dominikanoj en 1927 kiu studas ekumenismon kaj kies revuo estas konata en kristanaj universitatoj tra la tuta mondo. Frato Franck Lemaitre, direktoro de ISTINA, aŭskultis la prelegon kaj interesiĝis pri la temo tute ne konata de li. La prelego de C. Lavarenne okazis en franca lingvo pro le ĉeesto de Franck Lemaitre kaj de komencantoj. François Vilhelm (kaj François Lo Jacomo) rekte tradukis al esperanto la tutan prelegon por elsendi ĝin samtempe sur la reton. Estis vera glorefikado kiu meritas enskribon en la rekordlibro.

Post la prelego, ni ĝoje tagmanĝis en la sidejo de ISTINA rizosalaton preparita de la nordanoj en Evry. Poste, ni tuj veturis apud la katedralon Notre Dame. Tie, ni retrovis fraton Marc Chauveau, fakulo pri moderna arto kiu partoprenis la komision pri la nova meblaro de la katedralo. Sur la placo antaŭ Notre Dame, li enkondukis nian viziton klarigante le teologian signifon de la nova meblaro kaj de la nova lokorganizo. Ni poste vizitis la katedralon transfigurita per plenbrilanta suno. Je la fino de la vizito, la grupo iris al la Ĉerizejo, sidejo de Espéranto France (kaj de FKEA), por la ĝenerala asembleo de FKEA.

Dimanĉe, la grupo kiu loĝis en Évry ĝuis plian programon. Frumatene, la ĝardenemuloj plantis ok fruktarbojn en la klostro kaj malantaŭ la preĝejo. La afero estis majstre gvidita de nia fama esperanta ĝardenisto Johano-Danielo Duthoit. Poste, la grupo partoprenis la matenan meson en la konvento. La preĝejo estis plena de koloraj homoj devenante de ĉiuj mondpartoj. Fine de la meso, la prezidanto, fr Jean-Claude Lavigne prezentis nian grupon kaj invitis nin klarigi kio ĝi estas. La tuta grupo venis antaŭ la altaron kaj ni klarigis antaŭ la asembleo kio estas esperanto, ĉefe lingvo de paco. Poste ni kantis kristanan kanton "Spiru en ni Sankta Spirito" kaj tuj la asembleo ritme aplaŭdis ĝis la fino de la kanto. Estis granda sukceso.

Ni tagmanĝis en la konvento bongustan rokfortan pastaĵon preparita de Ludoviko Vaesken kiu komencis lerni la lingvon lastan septembron. Évry estas tute nova urbo kreita en 1970. En la centro de la urbo tuj antaŭ la konvento staras nova katedralo inaŭgurita dum la sankta semajno 1997. La papo Johano Paŭlo II vizitis ĝin poste dum la tutmondaj junularaj tagoj en Parizo. Bonŝance, fratino Annick kiu vivas tie ekde antaŭ la inaŭguro gvidis nin tra la bela katedralo konstruita naŭ jarcentoj post Notre Dame. Ĉiuj partoprenantoj multe ŝatis la vojaĝon kaj ni esperas ke la esperantaj semoj disĵetitaj en Evry plu kreskos.

*El la revue Norda Kuriero, redaktis Benedikto Ente*